

# SIMPOZIO

LA ARTO DE KOMUNIKADO, KOMUNIKADO DE ARTOJ

Kunming, 25 Julio 2012

**Subtenata de:**

Kolegio de Supera Edukado, Yunnan-Universitato

La Profesia Artkolegio de Kunming

Komitato de Supera Edukado, Yunnan-a Asocio de Privata Edukado

**Organiza komitato**

**Prezidanto:**

Prof. DONG Yunchuan, Yunnan-Universitato, Ĉefsekretario

de Yunnan-a Asocio de Supera Edukado

Prof. DUAN Yongxing, Profesia Artkolegio de Kunming

**Vicprezidanto:**

Prof. YU Dalin, Profesia Artkolegio de Kunming

**Membroj:**

Prof. WU Xueyuan, Instituto pri Nematerialaj Heredaĵoj

Prof. WANG Minhao, Shanghai-a Federacio de Socisciencaj Rondo

Prof. SHI Ronghua, Profesia Artkolegio de Kunming

Prof. HU Yunbin, Profesia Artkolegio de Kunming

S-ro Stefan MacGILL, Prezidanto de ILEI

Prof. Dr. GONG Xiaofeng, Universitato de Nanchang,

Estro de LKK, Prezidantino de la Ĉina Sekcio de ILEI

Prof. Dr. Duncan CHARTERS, Principia-Kolegio, Usono,

Vicprezidanto de ILEI

**Sekretario:**

S-ro Radojica PETROVIĆ, Universitato de Kragujevac, Serbio, Estrarano  
de ILEI

## Simpozia programo

- 08:30-09:30 Akcepto de simpozianoj
- 09:30-09:45 Malfermo
- 09:45-10:45 Prelegoj\*:
1. LIU Xuxiang, kolegio de Supera Edukado, Yunnan-Universitato:  
“Edukado Transkultura: Saĝo de Kultura Interposedado”
  2. Penny VOS, Jennifer BISHOP, ILEI, Aŭstralio:  
“Invito al la Tuta Vasta Mondo”
- 10:45-11:00 Kafaŭzo
- 11:00-12:20
3. XU Shaohua, vicprofesoro de Teknologia Universitato de Kunming, “La problemo de 'vizaĝhonor': studo de kulturaj diferencoj en transkultura komunikado inter Ĉinoj kaj Okcidentuloj”
  4. Ronald J. GLOSSOP, ILEI, Usono: “Kiel artistoj povas antaŭenigi pacon mondan”
  5. YUAN Hongyu, prezidanto de Yunnan-a Esperanto-Asocio,  
“Yunnan bezonas Esperanton, kaj Esperanto bezonas Yunnan”
- 12:20-13:30 Lunĉpaŭzo
- 13:30-15:00
6. Mireille GROSJEAN, ILEI, Svislando, “Klasointerŝanĝoj: konatiĝstrategio kun lingva, socia kaj kultura aspektoj”
  7. ZHOU Hong, docento, doktorkandidato, Yunnan-Universitato, “La harmonio inter la animo kaj artoj”
  8. DU Shengyan kaj LI Mei, magistras kandidatoj, “Lingvo kaj Personeco”
- 15:00-15:15 Kafaŭzo
- 15:15-16:15
9. XIE Min, docento, La Profesia Artkolegio de Kunming, “Scio – Konsento – Identigo: Artaj Valoroj en Transkultura Komunikado”
  10. Alan BISHOP, Universitato Monash, Victoria, Aŭstralio: “La edukado pri valoroj en matematikaj kaj sciencaj kursoj”
- 16:15-17:45 Diskuto kaj konkludo
- 17:45-18:00 Fermo de la simpozio

\* Ĉiu preleganto havas je dispono 15 minutojn por prelego plus 10 minutoj por respondi demandojn.

## RESUMOJ

1. LIU Xuxiang, profesoro, Kolegio de Supera Edukado, Yunnan-Universitato:

### **“Edukado Transkultura: Saĝo de Kultura Interposedado”**

La celo de Unesko advokata transkulturan edukadon estas kultura interposedado. Se du kulturoj de malsamaj esencoj renkontas sin, povas esti kaŭzita kultura interflapo kaj ankaŭ kultura interposedado. La plej grava punkto restas en la sinteno de homoj antaŭ kulturoj de malsamaj esencoj. Kiam oni komprenas la rolon de edukado por antaŭenpuŝi kulturecon, interposedadon, transkultura edukado venas al la estrado.

La efektivigo de transkultura edukado postulas saĝon por kultura interposedado, jam ek de la celo de tia edukado. Vidante de la bazaj kvalitoj de la edukatoj transkulturaj ni ja bezonas saĝon de kultura interposedado, kiu estas necesa por transpasi malsamajn kulturojn, por atingi interkomprenadon inter malsamaj kulturoj, kaj por formi homan kulturecon mondscale.

Ĉi tiuj strategioj estiĝas en interkomprenado, konsentiĝo, lernado kaj sorbado inter diversaj kulturoj. Kultura interposedado unue substrekas interkomprenadon inter malsamaj kulturoj; due, surbaze de komprenado, ĝi devas havi konsentiĝon de malsamesencaj kulturoj je iliaj valoro kaj sento; kaj trie, ĝi devas ebligi sorbon de kvintesencojn por plibonigi sian propran kulturon.

2. Penny VOS, Jennifer BISHOP, ILEI, Aŭstralio: **“Invito al la Tuta Vasta Mondo”**

Estas por mi hodiaŭ privilegio paroli al vi pri tre grava Aŭstralio projekto de mia juna koleginino, Peni Vos, sperta instruistino laŭ Montessori metodo kaj klera esploristino pri maniero utiligi siajn studojn kaj spertojn por evoluigi novan instrulibron kaj kurson por bazaj lernejoj, kun infanoj 5 – 11 jaraj.

Ĉi tiu projekto estas kvazaŭ sekvo de la projekto EKPAROLI, (Esperanto Kiel Propedeŭtiko Al Rapidigo de Orient-Lingvo-Instruado) kiun mia edzo D-ro Alan Bishop kaj mi kreis ĉe Universitato Monash 1994-97.

Hodiaŭ mi parolas pri la tute nova kurso de Peni Vos ‘Apprenticeship Language Learning- ALL’ (en la angla lingvo signifa vorto por ‘Ĉiuj’). En Esperanto ni povas diri provizado de lingvolernado kiel metio por kuraĝigi instruistojn de bazaj lernejoj tra la tuta mondo konvinkiĝi pri la granda valoro de Esperanto-lernado por ĉiuj infanoj.

- Studentoj de universitatoj
- Studentoj de kolegioj pri instruisto-trejnado
- Instruistoj de bazaj lernejoj

La kurso estas kreita por studentoj de universitatoj kaj kolegioj de instruisto-trejnado, sed ankaŭ por ĝeneralaj instruistoj de bazaj lernejoj.

3. XU Shaohua, vicprofesoro, doktoro, Teknologia Universitato de Kunming:

**La Problem de 'Vizaĝhonor' --- studo de kulturaj diferencoj en transkultura komunikado inter Ĉinoj kaj okcidentanoj**

“Vizaĝhonor” estas komuna fenomeno de ĉina kaj okcidenta kulturoj. Tamen estas diferencoj inter ili koncerne vizaĝhonoron, kiuj dependas de la diferencoj inter kolektiva valoro de ĉinoj kaj individualista valoro de okcidentuloj, ĝenerale. Ĉinoj tenas kolektivian vizaĝhonoron pli alte, dum okcidentuloj substrekas individualistan vizaĝhonoron. Ĉio tio montriĝas en ĉiutagaj aktivadoj de vokmaniero, bedaŭesprimado, petado, ktp. Ĉinoj emas respekti alian kaj malrespekti sin en vokado, dum okcidentuloj emas rektan vakadon. Okcidentuloj havas altan frekvencon fari pardonpeton, dum ĉinoj konsideras pli multe sian vizaĝhonoron kaj malmulte petas pardonon rekte. Okcidentuloj faras peton kaj postulon pli rekte ol ĉinoj, kiuj emas uzi nerektan strategion. Por eviti interkulturajn konfliktojn relate vizaĝhonoron en transkultura komunikado, estas necese, ke oni kombinu la kulturajn faktorojn de ambaŭ flankoj por kompreni unu alian kaj krei ĝentilan kaj harmonian homrilaton.

4. Ronald J. GLOSSOP, ILEI, Usono: **“Kiel artistoj povas antaŭenigi pacan mondon”**

En ĉi tiu prelego mia celo estas sugesti al artistoj de ĉiuj specoj tri temojn kiujn mia opinio ili povus uzi por antaŭenigi pacan mondon. Ĉu la artisto estas muzikisto aŭ pentristo aŭ verkisto de literaturo aŭ skulptisto aŭ poeto aŭ fotografisto aŭ alia speco de artisto, mi opinias ke oni povus per ĉi tiuj tri temoj kuraĝigi la homaron labori pli avide por mondo kiu estas pli justa kaj pli paca.

La unua temo estas la unueco de ĉiuj homoj eĉ kvankam ni eble vivas dum malsamaj periodoj kaj loĝas en diversaj landoj kun malsamaj kulturoj. Ni ĉiuj estas homoj kaj membroj de unu granda homa familio. Pro tio ni devus kunlabori



por la bonfarto de la tuta homa familio. Neniu elektas kiam oni naskiĝas aŭ kie oni loĝas dum infano. Neniu elektas esti inteligenta aŭ talenta, malinteligenta aŭ handikapita. Tial tiuj kiuj estas pli bonŝancaj devus helpi tiujn kiuj ne estas tiel bonŝancaj.

La dua temo estas la defio konservi nian kolektivon hejmon, la Teron, por ke ni kaj ĉiuj specoj de vivantaj estaĵoj povu daŭri vivi. Estas almenaŭ tri partoj de ĉi tiu problemo. Unu estas la kvanto de homoj kiu povas vivi sur la planedo. En la jaro 1927 estis 2 000 milionoj da homoj sur la Tero. Estis 4 000 milionoj en la jaro 1975, 6 000 milionoj en la jaro 1999, kaj 7 000 milionoj en la jaro 2011. Ŝajnas ke estos 8 000 milionoj da homoj en la jaro 2025 kaj 10 000 milionoj en la jaro 2083. Kiom da homoj la planedo Tero povos vivteni? Se estus tro, ĉu ne estos militoj kaj perfortaj konfliktoj? Por konservi la Teron kaj la paco inter homoj ni ĉiuj devas decidi havi nur unu aŭ du idojn. Dua parto de la problemo estas la kvanto da rimedoj kiun ĉiu persono uzas aŭ malŝparas. Aparte grava afero estas la kvanto da pura akvo kiun ĉiu homo bezonas. Ni devas trovi pli bonajn metodojn por konservi puran akvon kaj purigi malpuran akvon. Tria parto de la problemo estas la kvanto da poluo kiun la homaro produktas, aparte de karbon-dioksido kaj aliaj aĵoj kiuj kaŭzas ĉiam pli varmiĝon de la Tero. Ni homoj devas trovi kaj uzi aliajn fontojn de energio krom karbo kaj petrolo.

La tria temo estas la bezono konstrui bonajn politikajn instituciojn, por ke la konfliktoj kiuj ĉiam povas okazi inter individuaj homoj aŭ grupoj de homoj estu solvitaj pace kaj senperforte. Tiaj konfliktoj devus esti decidataj laŭ politikoj kaj leĝoj kolektive starigitaj de la tuta komunumo. Ni ne volas havi anarkion kaj la sekvajn perfortajn batalojn kiuj sen registaro okazus en niaj urboj, niaj provincoj, niaj landaj, kaj nia mondo. Bedaŭrinde, registaroj ne ĉiam estas bonaj registaroj, sed manko de ia ajn registaro preskaŭ ĉiam estas malbona situacio. Por konservi pacon en niaj homaj komunumoj, ni devas havi bonan popolan registaron. La homaro bezonas bonajn registarojn, kaj por la diversaj landaj komunumoj kaj por la tutmonda komunumo. Por havi pacon interne de lando kaj por pritrakti la problemojn alfrontajn la landan komunumon, ni devas havi bonan landan registaron. Por havi paceman mondan kaj por pritrakti la problemojn alfrontajn la tutmondan komunumon, ni devas havi veran tutmondan registaron. La Unuiĝintaj Nacioj estas paŝo al tia celo, sed ĝis nun nia tutmonda homara komunumo ankoraŭ ne havas veran mondan registaron. Sekve ni ankoraŭ havas multajn

militojn kaj aliajn gravajn tutmondajn problemojn kiuj ne ricevas sufiĉe da atento.

5. Yuan Hongyu, ĉefkonsilanto de Yunnan Esperanto-ligo: "Provinco Yunnan bezonas Esperanton kaj Esperanto bezonas Provincon Yunnan"

Sennombraj regionaj lingvoj kaj ideogramoj estiĝis sekve de la estiĝo de homaro. Tio donas oportunon en la homaj vivo kaj laborado por loĝantoj en la sama regiono, sed ankaŭ kaŭzis diversajn regionajn kulturojn, religiojn kaj kutimojn. La malkredemo, malkomprenemo, malestimo, malamo estigitaj de la diverseco kaj nekompreneco en la regionaj kulturoj, literaturoj, lingvoj, religioj kaj kutimoj ege damaĝas la rajton de homaraj egaleco, vivado kaj feliĉo, kaj fariĝis unu el la kaŭzoj de la monda tumulto.

Esperanto estas lingvo kreita por maligi tiu ĉi gravan kaŭzon. Anstataŭ al iu nacio, regiono kaj lando, ĝi apartenas al la tuta homaro. Se ĉiu en la mondo uzos ĝin, ili ĝuos familiecajn amikecon kaj harmoniecon.

6. Mireille GROSJEAN, ILEI, Svislando: "Klasointerŝanĝoj: konatiĝstrategio kun lingva, socia kaj kultura aspektoj"

Povas esti interŝanĝoj inter infanĝardenaj klasoj per la helpo de la instruistoj. Povas esti same en elementa lernejo. Povas esti rekta kontakto de lernanto al lernanto, kiam la lingvokapablo sufiĉas.

Baza principo: la gelernantoj estu samaĝaj.

Ĉiam la organizado de tiaj kontaktoj okazigas plian laboron por la instruisto.

La instruisto devas ĉion klarigi, agadas kiel "interface". Volontula laboro.

Instruisto staras inter direktoro, kolegoj, lernantoj, gepatroj.

Dum renkontiĝoj: Lernado ekster klasoĉambro. Neniu gramatiko. Oni forgesu la instruprogramon. Oni ne postulu la uzon de certa lingvo. Lernantoj uzas la fremdan lingvon spontane. Multaj eraroj. Ne gravas.

Lerni en kontakto kun samaĝuloj.

Lerni en vera situacio. Lerni sen instruisto. Li estu for. Li ne taksu.

Junuloj devas lerni akcepti gaston, en kazo de fizika renkontiĝo.

Nepras forviŝo de antaŭjuĝoj pri kulturoj.

7. ZHOU Hong, docento, dotorkandidato, Yunnan-Universitato: "La harmonio de la animo kaj artoj"

"Harmonio" estas la kerno de la tradicia ĉina kulturo. Nun harmonia kulturo jam enmetiĝis en la ĉefan fluon de ĉina kulturo. Tio inkludas 4 bazajn nociojn pri valoro: korpa kaj anima akordo, interhoma akordo, socia kaj persona akordo, natura kaj homara akordo. Muziko kiel aŭskulta arto povas amplifikigi sinespriman kapablon kaj akceli interfluojn inter homoj en penso kaj sento. Laŭ la ekzemploj de la verkaĵoj de Beethoven kaj afrika parola tamburo, oni povas vidi, ke arto havas aktivajn funkciojn en eduko de akorda mensostato kaj eduko de interhoma harmonio. Arto estas perfektigata kurso de eduko de harmonio. Tio helpas, ke oni objektive rigardas la socian diferencon kaj neekvilibran fenomenon dum la transformado de societo kaj la akceliĝo de landa konstruado, kaj donas helpojn al societanoj, por ke oni havu katarson, komprenu la homan vivon kaj kreu novan vivon.

8. DU Shengyan, LI Mei, magistrokandidatoj, Yunnan-Universitato: "Lingvo Kaj Identeco"

Lingvo estas la plej grava interkomunikaĵa kaj interŝanĝa ilo por homaro, samtempe kaj la parto de kulturo, kaj ankaŭ la grava distingilo por homa identeco. Ĝuste je la diro de erudiciulo Du Weiming: Lingvo estas unu de origina interligilo de homara identeco. Pro tio, ĉia lingvo havas sian "aparteno de kulturo". La diferenco kaj disputado de iaj lingvoj plimulte estas je viva moro, politiksystema regulo kaj kultura tradicio en malsamaj identecoj. La artikolo prove analizas la malsamajn lingvajn fenomenojn en "identeca strukturo", "identeca krizo" kaj "identeca identigo" de: la perforta instruado de la japana lingvo sub la Japana invado al Ĉinio je la jaro 1937, la senigo de la indiĝenaj lingvoj sub koloniismo en koloniisma periodo, la kriza kaj maltrankvila mult-identeca sento de hongkongano pro Tri Idiomoj kaj Du Lingvoj je la revena komenco de Hongkongo, la konkreta okazaĵo de la kontraŭleĝa transmigrado ĉe la landlimo inter Ĉinio kaj Vejtnamio. Estas por emfazi la striktan interna-rilaton de lingvo kaj identeco, ĉu kiel la interkomunikaĵo ĉu kiel kultura memo.

9. XIE Min, docento, Kunming-a Profesia Artkolegio: "Scio, konsento, identigo: artaj valoroj en transkultura komunikado"

Kiam oni parolas pri ideo de multkultureco, oni akcentas ĝian esencon, --- la scioj akiritaj el malsamaj lokoj, malsamaj homogrupoj sub malsamaj naturaj cirkonstancoj. Ni nomas la sciojn kiel lokajn sciojn. Fakte lokaj scioj estas konsiderataj kiel konkretaj agadoj de kultura diverseco, kiuj ekzistas paralele kun la post-modernisma konscio. Kun la evoluo de la post-industria socio, la potenca disvastigo de okcidenta kulturo damaĝis la malsamajn strukturojn de la monda civilizacio. Kia ajn arto kun la enhavo estas bazita sur lokaj scioj. Arto estas plej "homeca" parto de la lokaj scioj. Alivorte, arto estas la parto, kiu montras progresadon, kleriĝadon kaj strebadon de homo mem. Arto liveras al homoj instrumentojn kaj platformojn, sur kiuj oni rekonas kaj reciproke aprecas, kaj, faras la interf luojn, komunikojn, komprenigojn en harmonia kunekzistado. Arto prezentas ankaŭ la rimedojn efektiviĝi multkulturecon, kies stato estu "akorda en malsameco."

#### 10. Alan BISHOP, Universitato Monaŝo, Melburno, Aŭstralio: "La edukado pri valoroj en matematikaj kaj sciencaj kursoj"

Matematiko kaj sciencoj kiel kultura scio estas signifplenaj. Matematika kaj scienca edukado havas siajn valorojn.

- Valoroj estas parto de la edukada procedo je ĉiuj niveloj.
- Ili rolas grandege por doni senson de persona kaj socia identeco al studentoj.
- La ideo 'valoroj' ne estas nova en antropologio,
- Nek en edukado ĝenerale,
- Sed ŝajnas esti nova ideo en la edukado pri matematiko kaj scienco. Kial?

Plej multaj da personoj pensas ke matematiko kaj scienco estas universalaj, kaj (tial) ili estas sen kulturo kaj (tial) sen valoroj. Se oni demandas al instruistoj: "Kiujn valorojn vi instruas kiam vi instruas matematikon aŭ sciencan?" oni ofte rimarkas strangan mienon kaj embarasitan respondon. Ekzemple, unu instruisto respondis al mi: "Mi ŝatas instrui matematikon ĉar mi ne devas instrui valorojn"!

Sed la instruado kaj lernado de valoroj certe okazas en klasĉambroj de matematiko kaj scienco, kiel en ĉiuj aliaj instruadaj situacioj. Sed valoroj malofte estas eksplicitaj en tiuj-ĉi klasĉambroj. Tial la edukada defio koncernas eksplicitigi tiujn "kaŝitajn" valorojn en matematikaj kaj sciencaj klasĉambroj.